TRA la ESPERANTA LITTERATURO

Niaj aŭtoroj

La verkoj de D-ro Zamenhof estas la stilaj modeloj, kies atenta tralegado estas rekomendata al ĉiuj Esperantistoj. La elpensinto de Esperanto multe skribis, ĉu proze, ĉu verse; li tradukis kaj ankaŭ verkis originale. Multaj el liaj verkaĵoj troviĝas en la malnova gazeto « l'Esperantisto », ĉefe en la formo de artikoloj. La aliaj-la plej gravaj- estas entenataj en la libroj, kiujn eldonas firmo Hachette. La „ Fundamenta Krestomatio " enhavas inter aliajn tiun belan tradukon el fabelo de Andersen, *La Virineto de maro*, kiu estis skribita antaŭ longe, en lingvo simpla, klara, flua, mirinde fleksebla kaj alfarata al la temo de tiu tuŝanta rakonto. La nuntempaj verkoj de l'Doktoro prezentas preskaŭ nenian gravan stilan ŝanĝon rilate al la antaŭaj. Oni povas nur rimarki kreskantan tendencon al la elekto de l'vortoj internaciaj, pli grandan laŭvortecon en la traduko de l'naciaj idiotismoj, malpli oftan uzon de l'propozicioje, k-t-p, sed la ĉefaj karakterizaj ecoj de la stilo restis la samaj. Tiu stilo ŝajnis malfacila al kelkaj Esperantistoj, kiuj opiniis, ke tio ĉi venas de la Slaveco de ĝia aŭtoro ; la konstruo de l'frazo (tamen tre logika, se oni ĝin ekzamenas, forlasante ĉian nacian kutimon) aparte timigas multajn lernantojn. D-ro Z. klarigis mem, ke lia stilo ne estas speciale Slava, sed simple Esperanta ; se la plej multaj Slavoj skribas Esperanton pli korekte ol alilingvaj Esperantistoj, tion ĉi kaŭzas la fakto, ne ke la Esperanta stilo estas Slava, sed simple ke, ĉar la frazkonstruo de la Slavaj lingvoj estas pli logika ol en aliaj lingvoj, la Slavoj per tioĉi *nature* skribas logike, dum la aliaj popoloj bezonas ekzerciĝadon. Par konvinkiĝi pri tio, oni ana lizu ian ajn verkon de D-ro Z. en tiu ĉi rilato kaj oni konstatos, ke lia franzkonstruo plene akordiĝas kun la nature sinsekvo de niajvideoj. Nia majstro ankaŭ ne timas preskaŭ laŭvorte traduki la naciajn esprimojn, kaj kontraŭ tiuj, kiuj pretendas, ke oni devas eviti tiajn ne internaciajn tradukojn, li diris, ke, evitante la malfacilaĵojn kaj penante logikigi ĉian nacian apartaĵon, ni neniam ellaboros kaj pliriĉigos la lingron. Tia tendenco estas konstatebla en liaj lastaj tradukoj ; *La Rabistoj*, el Schiller, kaj ĉefe en *La Revizoro*, el Gogol, kiu, malgraŭ kelkaj malfacilaĵoj, estas unu el la ĉefverkoj de nia litteraturo kaj estas aparte rimarkinda pro la impreso de vivo, kiun donas la dialogoj. Inter la originalaj verkoj de D-ro Z., oni devas citi la tri parolojn ĉe la malfermo de niaj kongresoj ; ili envahas fragmentojn de la plej pura beleco kaj, pli bone ol tradukoj, montras le ecojn de la „ Zamenhofa " stilo. La legadon de la Zamenhofaj verkoj ni konsilas komenci nur tiam, kiam la lernanto jam akiris ideon pri la spirito de Esperanto kaj fariĝis kapabla flue legi ian ajn aŭtoron ; al la personoj, kiuj plene studis nian lingron, la legado de la verkoj de nia majstro estos fonto de granda plezuro kaj ĝuo, ĉar el tiu stilo mem, Esperanto elsuĉis sian vivon kaj propran spiriton.

La plej kenata Esperantista aŭtoro estas sendube S-ro D-ro K. Bein, kiu subskribas siajn verkojn per la pseŭdonimo Kabe. La karakterizaj kvalitoj de la Kabeâ stilo estas ; simpleco, klareco, internacieco. Li penas eviti la malfacilaĵojn de l'originalo, aŭ, pliĝuste, li Esperantigas ilin tiamaniere, ke ili estu internacie kompreneblaj. La apartaĵoj de l'nacia lingvo tradukita malpli rebrilas ol en la verkoj de D-ro Zamenhof, sed, pro tio, ili akiras pli grandan klarecon kaj pli facilan legeblecon. Al tio ĉi oni aldonu, ke Kabe Esperantigas nur vere tradukindajn verkojn : li havas la senton de la tradukindaĵoj, kiu tro ofte mankas al multaj Esperantistoj. En la *Pola Antologio* li konigas al ni la plej belajn pecojn de la Pola literaturo ne multe konata de eksterlandanoj, kaj tamen tiel rimarkinda. La belaj tradukoj de l'*Interrompita Kanto*, vera juvelo de nia verkaro, la longa *Faraono*, nun aperanta, la *Fabeloj de frato Grimm*, mirindaj pro ilia simpleco kaj naiveco, estas inter la plej ŝatindaj produktaĵoj de Esperanto, sed, laŭ nia opinio, ilin superas ankoraŭ *La Fundo de l'Mizero*. Tiu malluma belega priskribo de la malĝoja vivado de lepruloj en la Siberia „ tajga " estas leginda de ĉiuj Esperantistoj. Notinda estas la fakto, ke Kabe volonte uzas kaj elpensas novajn vortojn, anstataŭ trouzi la sufiksojn aŭ kunmetitajn vortojn ; tio aldonas al la klareco de lia stilo, kvankam pri tio lin volonte riproĉus kelkaj „ konservativaj " samideanoj, se ili aliflanke ne estus devigataj lin pardoni, konsiderante la klasikecon de lia stilo. Alia konata Esperantisto, kiu estas unu el la plej malnovaj, S-ro Grabowsky en sia *Antologio* taadukis kelkajn pecojn de diverslanda litteraturo, kiuj estas modeloj de stilo flua, simpla kaj harmonia. Kiam oni pripensas, ke tiaj rimarkindaj literaturaj tradukoj estis faritaj en la tempo kiam ekzistis nur simpla folio-vortaro da 900 radikoj en la tiama Esperantali braro, oni estas konvinkita pri la senkompara riĉeco de nia lingvo kaj pri la vereco de la Leibnitza principo : „ La riĉeco de lingvo ne dependas de la multeco de la afiksoj sed de la facileco, laŭ kiu oni povas formi novajn vortojn per ili ". Antaŭ ol forlasi la Slavan aŭtoraron, ni devas ankoraŭ citi *Gernet*, kun sia bela traduko *Fantomoj* (bedaŭrinde elĉerpita), *Devjatnin*, *Seleznjov*, *Hofman*, ĉiuj Esperantistoj de la unua horo, kiuj estas pli konataj kiel versistoj, sed tamen ankaŭ lasis prozaĵojn, kiuj estas klasikaj modeloj. Fine ni ne forgesu D-ron F. Zamenhof, kiu prilaboras kun granda talento kaj lerteco *Esperantan Proverbaron* kaj la pseŭdonimulon I. Malfeliĉulo, kiu originale verkis *Sep Rakontoj*, kiuj estas atentindaj ĉu pro la pureco de l'stilo ĉu pro la realeco de la priskriboj de la Slava vivado. Francujo ankau naskis multajn Esperantistajn aŭtorojn. Unu el la plej skribemaj estas D-ro Valienne, kies versa parto estas aparte citinda, sed, kiel prozisto, li jus donis al la Esperantistaro dikan originalan romanon, kiu prezentas nek stilan apartaĵon, nek grandan altliteraturan valoron, sed pasiigos muitajn legontojn kaj instruos ilin samtempe. Por konvinkiĝi pri tio, oni legu la *Kastelo de Prolongo* Al S-ro Meyer oni ŝuldas bonajn tradukojn de *l'Avarulo*, el Molière, kaj *Vojaĝo interne de mia ĉambro*, el X. Maistre, S-ro Boirac tradukis en preciza lingvo la malfacilegan *Monadologion* de Leibnitz ; li ankaŭ donis alni varman rakonteton *Perdita kaj Retrovita* kaj bonegan tradukon de *Don Juan*. S-ro Boirac skribas en klasika kaj tre pura lingvo ; li ne uzas novajn vortojn kaj neologismojn ; tamen li estas la sukcesa elpensinto de l'sufikso *aĉ*, antaŭ kiu moliĝas la kolero de la plej novmalamaj Esperantistoj ! Nidevas ankaŭ citi S-ron Touchebeuf pro liaj delikate skribitaj *Rakontoj al mia bebulino* kaj inter la Belgoj S-ro Seynæve kaj Van Melckebeke, kiuj tradukis kelkajn belajn pecojn en *la Paĝoj el la Flandra literaturo*.

La aliaj nacioj ne ankoraŭ naskis multajn aŭtorojn. S-ro Meier (Germanujo) ŝatas traduki versojn ; tamen ni tre preferas liajn prozajn tradukojn, kiuj forte rebrilas la Germanan originalon kaj atestas veran lertecon. Fine, kelkaj Esperantistoj riproĉos nin, ke ni ne citis la Avilof'an tradukon de *la Ruĝa Rido*, kiu, en realeco, tute ne estas skribita en klasika stilo, sed tamen havas novajojn kaj stilan liberecon kiuj estas ŝatataj de la serĉantoj de novaj formoj kaj de ankoraŭ ne uzitaj vojoj.

(daŭrigota) FLUGILETO.

LINGVA FAKO

Lingvaj Klarigoj

Ni tie ĉi plezure respondos ĉiujn demandojn gramatikajn, vortajn aŭ sintaksajn, kiujn sendos al ni niaj legantoj, kondiĉe, kompreneble, ke tiuj demandoj prezentu ĝeneralan intereson kaj celu punktojn ne tute elementajn.

Al S-ro W. R. Pri la vorto tajdo. — La vorto *tajdo* (proponita de S-ro Rollet de l'Isle por la maristojk), signifas marfluo, marmovo, alfluo kaj refluo). La vorton erte ni ne konas. Laŭ eble, estas rekomendinde uzi vortojn de la Universala Vortaro, ĉefe se oni skribas ne teknikajn tekstojn ; se ne, oni uzu vortojn rekomendatajn de la plej bonaj naciaj vortaroj kaj jam uza tajn de la plej multaj verkistoj ; oni sin detenu kiel eble plej de la elpenso de novaj vortoj por traduki ideojn, kiujn povas esprimi la vortoj de l'U. V.

Al S-ro A. S. Pri la prepozicio de kiel prefikso. — La propozicio *de* uzata kiel prefikso signifas ian *ŝanĝon* de stato aŭ de loko ; ekz : La birdoj deflugis de la arbo (la birdoj estis sur la arbo, sed ili knun estas aliloke, do ŝanĝo de loko) ; la ombroj delasis la monton (ili estis sur la monto, sed nun ne estas plu tie) ; li demetis sian mantelon (li metis ĝin en alian lokon). Oni ne devas konfuzi *de* kun *el* kaj *for* ; *el* estas la malo de *en* kaj *for* montras malproksimiĝon. Ekz : se iu estas en la cambro, oni povas diri al li deiru (t.e. ŝanĝu lokon, sed restante en la ĉambron), eliru (t.e. iru trans la pordo), foriru (malproksimiĝu).

EKZERCETOJ

Ĉe la Esperanto-Oficejo II

Mi rimarkas grandan paperon ĉe via fenestrego. Kio estas surskribita?

Tio, kion vi vidas, estas nia modesta afiŝejo, tio estas, simpla paperfolio, sur kiu ni ĉiusemajne skribas la informojn plej interesajn por la ĉitieaj samideanoj, ekzemple, la kunvenoj de l'grupo, la horoj de l'kursoj, la laste aperintaj libroj kaj jurnaloj, k. t. p ; ĉar tiu strato estas unu el la plej vizitataj de l'urbo, ĉiuj Esperantistoj povas tre simple informi sin pri ĉio, kio koncernas Esperanton ; anstataŭ elspezi monon por loka jurnaleto, ni faris tion ĉi. Plie, vi rimarku, ke la biblioteko de la grupo estas en nia Oficejo ; oni trovas tie ĉi plenan kolekton da Esperantaj libroj ; ĉiu grupano, kiu dez ras prunte preni unu pagas 4 Spesdekojn De la tempo kiam nia biblioteko estas metita en tiun Oficejon, la nombro de la prunteprenantoj kvinobliĝis

Via Oficejo estas vere rimarkinda, sed, sendube, por pagi ĉion tion ĉi, vi sukcesis varbi riĉajn eminentulojn, kiuj bonvolas monhelpi vin. Ha ! se en nia urbo, ni trovus tiajn protektantojn. sed ho ve ! niaj malmultaj Esperantistoj estas malriĉuloj kaj Esperanto estas ankoraŭ tre mokata... Kiam oni havas monon, oni povas ĉion fari...

Vi tute eraras, sinjoro, pardonu mian malkaŝemon. Por pruvi, ke vi eraras, ĉu vi permesas, ke mi rakontu al vi la historion de tiu Oficejo, se tio ne tedas vin ?

Kompreneble, mi plezurege aŭdos vin.

Kiel vi vidas laŭ la fenestregoj de mia magazeno, mi estas librovendisto. Antaŭ unu jaro, Esperanto ekaperis en nian urbon ; mi mendis kelkajn lernolibrojn kaj vendis ilin en mallonga tempo, sed mi estis tute skeptika pri la sukceso de Esperanto kaj opiniis, ke la favoro de la publiko daŭros nur malmultajn semajnojn. Efektive, post kelka tempo, mi eksciis, ke grupo Esperantista estis fondita, sed, malgraŭ tio, la vendado de la lernolibroj malpligrandiĝis kaj la intereso por la lingvo ŝajnis malaperi. Ian tagon, venas al mi la sekretario de l'grupo kaj, post kelkaj klarigoj, tiu sinjoro petis, ke mi bonvolu konstante elmeti ĉe mia fenestrego diversajn Esperantaĵojn kaj alpendigi surskribaĵon, sur kiu estis skribita la vorto Esperanto-Oficejo. Interŝanĝe, li promessis, ke li rekomendos mian librejon al ĉiuj Esperantistoj. Kompreneble, tio estis nur provo kaj mi povis ĉesigi ĝin laŭ mia deziro. Nu ! post kelkaj tagoj, mi rimarkis, ke la vendado de la libroj multe pligrandiĝas ; oni mendis al ni ĉiuspecajn librojn kaj Esperantaĵojn, kiel ke mi plezure pligrandigis la parton de mia fenestrego, dediĉitan al Esperanto. Ian tagon, venis al mi fremdulo, kiu ekparolas al mi Esperante ; kompreneble, mi tute ne povis respondi ; unu semajnon poste, venas alia fremda Esperantisto, al kiu mi ne povis respondi La nombro de la fremduloj pligrandiĝis : por ne ŝajni malklera, mi decidis lerni Esperanton kaj mi fariĝis mem fervora Esperantisto. Antaŭ kelka tempo, mi pentrigis per verdaj literoj la vorton *Esperanto-Oficejo* kaj organizis mian fenestrejon, kiel vi vidas : Nun, nia Oficejo estas en plena florado... Jen, mia rakonto ; mi tre timas, ke mi enuigis vin.

Kontraŭe, mi estis treege interesata de via rakonto kaj mi firme promesas, ke mi klopodos por efektivigi similan Oficejon en mia urbo, ĉar mi nun tre bone komprenas la aferon. Nun, mi iru al la hotelo ; antaŭ mia forveturo, mi certe vizitos vin, ĉar mi havis grandan profiton de tiu interparolado H.

FELIETONO DE " ESPERANTO " 3

LA SABLA HOMO

el E. T. A. HOFFMANN

(trad. A. R.)

Ne riproĉu min, kara amato, ke malgraŭ via antaŭsento pri Coppelius, mi estas denove tute serena. Efektive mi devas konfesi al ci, ke, laŭ mia opinio, ĉiuj terurajoj, pri kiuj ci parolis, okazis nur en cia imago. Povas esti, ke la maljuna Coppelius estis malsimpatia, kaj la fakto, ke li malamis la infanojn kaŭzis vian timegon antaŭ li. Kompreneble, en cia infana penso, la terura sabla homo el la legendoj kunligiĝis kun la maljuna Coppelius, kiu kvankam ci jam ne kredis pri la sabla homo, restis por ci ia fantoma monstro, danĝera por la infanoj. La malgaja okazintaĵo kun cia patro dum la nokto estis nenio alia ol la faro de du alĥemiistoj ; la patrino ne povis esti kontenta, ĉar verŝajne multo da mono estis senutile elspezita kaj, aliparte, kiel okazas al tiaj laborantoj, cia patro, kies spirito estis tute okupita de fantaziaj deziregoj al alta saĝo, ne pensis sufiĉe pri la familio.

Cia patro kredeble pro propra senzorgemeco kaŭzis sian morton, kaj pri tio Coppelius ne estas kulpa ! Ĉu vi suspektas, ke mi kieraŭ demandis la spertan najbaran apotekistton, ĉu tiel subita mortiga eksplodo estas ebla, kiam oni faras ĥemiajn eksperimentojn ? Li jese respondis, kaj deta le klarigis al mi kiel tio ĉi povas okazi kaj li por tio uzis nomojn tiel strangajn. ke mi tute ne povas ilin rememori. Nun ci eble indignos pri cia Klara ; ci diros : en tiun malvarman spiriton penetras nenia radio pri la mistero, kiu ĉirkaŭas la homon ; ŝi rigardas nur la diverskoloran suprajon de l'mondo kaj ĝojiĝas, kiel la infano, kiam li trovas oran frukton, en kies mezo kaŝiĝas mortiga veneno. Ha ! mia kara Nathanael, ĉu ci ke kredas, ke ankaŭ en serenaj, senzorgaj animoj ne ekzistas la antaŭsento pri malluma potenco, kiu perfide metas en nin ian fadenon, per kiu ĝi poste nin kaptas kaj forlogas sur danĝeran kaj pereigan vojon, kiun ni alie ne sekvus ; se ekzistas tia potenco, tiam ĝi devas esti tia sama, kia ni mem ĝin formas, ĉar nur tiel ni kredas al ĝi kaj por ĝi lasas la lokon, kiun ĝi bezonas por plenumi tiun sekretan laboron. Se ni havas firman saĝon plifortigitan per serena vivo, por ĉiam rekoni tiun malamikan eksteran influon kaj sekvi trankvile nian vojon, tiu sekreta potenco sukcesas ekregi en ni, ĝi en tiu okazo estas nur la fantomo de nia propra persono, kies interna parenceco kaj profunda influo sur nian spiriton nin jetas al la infero aŭ nin forravas en la ĉielon. Ci rimarkas, mia kara Nathanuael, ke ni ambaŭ, mi kaj frato Lothar, klarigis la fantaziecon de tiu via malluma potenco. La lastajn vortojn de Lothar mi ne tute komprenas, mi nur antaŭsentas kiel li pensas, kaj mi kredas, ke ĉio estas trevera. Mi petas cin, forpelu tute el cia spirito la malamindan advokaton Coppelius kaj la vendiston de barometroj Jozefo Coppola· Estu konvinkata, ke tiuj fremdaj aperoj ne havas potencon sur vin ; ili akiras ĝin, nur se vi kredas pri la profunda eksciteco de cia spirito ; se min ne profunde dolorus cia stato, vere, mi ŝercus pai l'advokato sabla homo kaj la vendisto de barometroj Coppelius. Estu ĝoja, bonhumora ! Mi promesis al mi estis por ci protektanta spirito ; kaj kiam en sonĝo venos al vi la malbenita Coppola forpelu lin per laŭta rido. Mi tute ne timus lin, nek liajn pugnojn ; li kiel advokato ne malbonigus miajn frandaĵojn nek kiel sabla homo miajn skulojn !... Por ĉiam, mia profunde amata Nathanael... k. t. p.

Nathanael al Lothar

Estas al mi tre malagrable, ke Klara, pro mia distro, ricevis kaj legis mian leteron al vi ; ŝi skribis al mi tre profunde filozolian leteron, en kiu ŝi detale pruvas, ke Coppelius kaj Coppola ekzistas nur en mia propre imago kaj estas faotomoj de mia propra memo. Cetere, ŝi apogas sian opinion per la via. Vi do parolis pri mi. Vi legis al ŝi plenan traktaton de logiko por ke ŝi trafe respondu.

Ni lasu tion ! — Nun, mi estas certa, ke la vendisto de barometroj Jozefo Coppola neniel estas la maljuna advokato Coppelius. Mi sekvas kursojn ĉe nove alveninta fama profesoro de fiziko, kiu estas nomata Spalanzani kaj estas Italo. Li konas Coppola jam de multaj jaroj kaj, laŭ liaj diroj, mi eksciis, ke li estas vere Piemontano ; Coppelius estis Germano. Tomen, tute kvietigita mi ne estas. Vi kaj Klara konsideru min kiel reviston, sed mi ne povas forpeli la impreson, kiun faris al mi la malamata vizaĝo de Coppelius. Mi estas ĝoja, ke Coppola forlasis la urbon.laŭ tio, kion al mi diris Spalanzani. Tiu ĉi profesoro esta mirinda originalulo ; malgranda ronda viro, la vizaĝo kun fortikaj vangostoj, delikata nazo, levitaj lipharoj kaj trafaj okuletoj. Pli bone ol per tiu priskibo, vi vidos lin, rigardante Cagliostro en Berlina poŝkalendaro ; tia elŝajnas Spalanzini.

Antaŭ ne longe, mi supreniris la ŝtuparon de lia domo kaj ekvidis, ke la kurteno de vitropordo havas malgrandan fendon ĉe unu flanko. Mi ne scias kial mi, ekscitita de scivolo, enrigardis. Alta, tre gracie, mirinde vestita virino sidis en la ĉambro antaŭ malgranda tablo, sur kiu ŝi tenadis ambaŭ brakojn kun la manoj kun plektitaj : ŝi sidis kontraŭ la pordo, tiel ke mi tute vidis ŝian anĝelan vizaĝon. Ŝi ŝajnis min ne rimarki, kaj ĉefe ŝiaj okuloj havis ion rigidan ; mi preskaŭ povus diri, ke ŝajnas al mi kvazaŭ ŝi dormas kun malfermitaj okuloj. Al mi ŝi faris tre strangan impreson kaj mi eniris pensema en la kursejon. Poste mi eksciis, ke la bela apero, kiun mi vidis, estas Olimpia, la filino de Spalanzani, kiun li pro stranga manio tenis enŝlosita, tiel ke neniu homo povis veni al ŝi. Eble ŝi estas idiota aŭ suferas alian malagrablaĵon. Sed kial mi skribas al vi tion ĉi. Pli bone, buŝe mi povus ĝin diri, ĉar ni renkontos nin unu la alian post dek-kvin tagoj. Mi revidos mian karan Klara, kiun mi verdire intencas iom riproĉeti pri ŝia troa filozofio. Tial mi hodiaŭ ne skribas al ŝi Mil kisoj... k. t. p.

(Daŭrigota).

12 NOVEMBRO 1907. Unu Numero : 10 CENTIMOJ (4 Spesdekoj) TRIA JARO. — Nº 19

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO

Unu Jaro . . . . Sm. **1.20** | Helpabono . . . . Sm. **4.—**

Spesmilo (Sm.) = 100 Spesdekoj (Sd.) = 2,50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj = ½ dolaro = 1 rublo = 2,40 kronoj aŭstr = 1,80 kronoj Skand (proksimume).

Oni abonas ĉe la Administracio
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

Bulgara Eldono : N. D. Kovaĉef, Sofio

REKLAMO

1 paĝo	Sm. **100.—**	¼ kolono . . .	Sm. **7.—**
1 kolono. . . .	» **25.—**	⅛ »	» **4.—**
½ »	» **13.—**	1/16 »	» **2 50**

25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj

Ĝeneralaj Agentoj : G. WARNIER, 46, Rue Sainte-Anne, **Paris-2e**
C. A. L. BROWNE, 53, Wych Street, **London W. C.**

Esperanto kaj Maristoj

La Estonto de Esperanto estas sur la maro

Malmulte da aferoj estas malpli konataj de la teranoj ol la maraĵoj ; kvankam al la maristoj mi ŝuldas multon en la nuntempa vivo. Tial opiniante ke ili povas tre utili la disvastigon de Esperanto, mi volas altiri la atenton al ili.

Ja, ĉiuj homoj uzas kotonajn tolaĵojn ; la plimulto lulas siajn revojn en la la vapo de l'kafo, en la fumoj de l'tabako ; la amantoj ornamas siajn belulinojn per multvaloraj plumoj kaj ŝtonoj. La popoloj ne bezonas plu la te rurajn malsategojn. La „liberaj ŝtatanoj " de Ameriko ŝategas sian mirindan teron. Sed kiom el ili, eĉ unu fojon, pensis ke tiuj kiuj donis al ili kotonon, spicojn, tabakon, juvelŝtonojn, sufi ĉeĝan grenon, eĉ patrujon, estas la sentimaj maristoj ! Kiom pripensis la kvanton da obtineco malavare elspezita de tiuj homoj por malkovri trezorojn kaj alporti al ili sufiĉegon kaj ĝuon ! Kiom ekvidis ke ilia gvidanta stelo meze de la furiozaj ondegoj estis ĉiam la sama verda stelo de Espero kaj idealismo kiun ni sekvas ! Memoru la vivon kaj la klopodojn de unu el la pli famaj : Kristofo Kolombo, kaj diru se en iliaj vicoj ne estas plej taŭgaj batalantoj por nia ideo.

Cetere la marveturantoj ne estas nur idealemaj, sed ankaŭ, kiel eble plej internaciaj el la homoj ; ĉar ne estas sur la tero aliaj kiuj pli ofte interrilatas kun fremduloj. Sajnas do al mi ke ili estas tute difinitaj por propagandi kaj kio estas jam pli grava — uzi nian lingvon. Ilis povos montri al la havenurbanoj tiun floron ankoraŭ maloftan hodiaŭ, fremdulon uzanta Esperanton.

Tiel opiniante, la tria Kongreso unuvoĉe aprobis la kreon de Marista Ligo kaj vigle admonis, en la tagordo, la jam ekzistantajn grupojn ke ili helpu tiun ligon. Samtempe kiam la kongreso akceptis tiun gravan decidon, speciala kunsido starigis regularon por la naskiĝanta ligo.

Laŭ tiu regularo [1]) la ligo celas disvastigi la uzon de Esperanto en la maristaro, kaj helpi la organizaciojn kies celo estas doni al la marveturantoj la profitojn elvenontajn el la uzo de Esperanto ; ĝi entenas naciajn sekciojn tute sendependajn kaj donos, tuj kiam eble, jarlibron enhavantan la nomojn kaj profesiojn de la maristoj kaj havenurbanoj vere esperantistoj.

Nuntempe la franca sekcio sin starigas — kaj estas antaŭvideble, laŭ la aproboj ricevitaj, ke ĝi sukcesos. Tuj kiam ĝi estos oficiale fondata, ĝi sendos al ĉiuj milit kaj komerŝipoj detalan cirkuleron pri Esperanto kaj organizos paroladojn en la havenoj. Cetere, ĝi ne atendis tiun oficialan fondon por agi ; ĝi, jam de kelkaj monatoj, ricevis de la Maristarministro la permeson por la oficiroj kaj militistoj partopreni en la ligo, kaj S-ro Carlo Bourlet faris tre aplaŭditan paroladon en la Supera Lernejo de Maristoj en Parizo.

En Anglujo kelkaj sindonuloj prenis sur sin la kunigon de la bonvoluloj por fondi nacian komitaton [2]). Kaj en la landoj en kiuj ne ankoraŭ ekzistas sekcio, la regularo antaŭdecidas ke ia nacia sekcio jam formita elektu korespondantojn kiuj bonvolos kolekti la informojn necesajn por la ĝenerala funkciado de la Ligo kaj prepari la fondon de naciaj komitatoj.

Nuntempe la franca sekcio serĉas tiajn korespondantojn kaj estos danka al la esperantistoj kiuj akceptos tiun malpezan taskon ; ĝi deziras prepari la vojon por ke, dum la kvara kongreso, la ligo povu ampleksiĝi. Ni ne devas tro rapidi, sed estas necesege ĉion antaŭvidi antaŭe, por ke 2 aŭ 3 kelkhoraj kunsidoj liveru praktikajn rezultatojn.

Ĉiuj do, kiuj opinias kun mi ke « Estonto de Esperanto estas, grandparte sur la maro " eklaboru. Ni komunikos al ili tion kion mi faros kaj ricevos en Francujo per tiu ĉi jurnalo, oficiala organo de la Ligo ; ili ankaŭ trovos ĉi tie informojn pri la ĝenerala agado de la Ligo kaj la nomojn de la naciaj korespondantoj.

René MESNY.

[1] Petu la plenan regularon de sinjoro Mesny, en Granville Francujo.

[2] Sinjoro Sydney, Waterloo, Liverpool, Wittaker, kaj S-ro Soutcombe. 16, Standford Avenue, Brighton.

TRA LA MONDO

Aŭstrujo.

Praha, Oktobro 1907.

La Aŭstra kaj Hungara parlamentoj kun, venis post libertempo en Wien kaj Budapest kaj la unua laboro, kiun ili devas fari estas renovigo de la kontrakto inter aŭstra kaj hungara duonoj de l'imperio tiel nomita „ aŭstro-hungara egaliĝo " (Virovnani, Ausgleich). La rajto de la parlamentoj estas akcepti aŭ malakcepti la kontrakton pri kies artikoloj longe diskutis kaj kiun kompromise ellaboris ministraroj aŭstra kaj hungara. Do ŝajnas konvene diri kelkajn vortojn pri la tuta problemo aŭstro-hungara kaj pri ĝia deveno.

Tiu ĉi problemo estas tiel malnova kiel la tuta kontrakto aŭstro-hungara, ĉar la fundadamentaj demandoj restis ĉiam neklarigitaj, eĉ intence mallumitaj. Estas vere interesa kaj, pro tiamaj, cirkonstancoj, karakteriza afero, ke en jaro 1867 dum konsiladoj pri tiu-ĉi aŭstro hungara kontrakto (kiun oni nomas „ aŭstro-hungara " tute senranrajte kaj rajte oni devus ĝin nomi hungara, ĉar en ĝi kontraktis registo ĝis tiam absoluta kun politika nacio hunhara renovigante hungaran konsti tucion) oni atentege evitis ĉion, kio povus naski ian malkompreniĝon inter hungarajdiplomatoj kaj reprezentantoj de la absoluta registo. La nekutima rapideco, laŭ kiu oni laboris kaj la konata mallerteco de Wiennaj polikistoj kondukitaj de S-ro Beust, kaŭzis amason da malklaraĵoj en la kontrakto. Laŭ ĝi, la imperio estis starigita laŭ dueca fundamento ; el ŝtato ĝis tiam unueca fariĝis du ŝtatoj, sed kelkaj aferoj estis proklamitaj por ĉiam komunaj. Estas precipe : diplomata kaj komerca reprezentado en fremdlando, tuta organizado de la militaj aferoj, kaj financoj por tio bezonaj Krom tiuj aferoj la kontrakto de 1867 nomas pluajn aferojn, kiujn ĉiu el la du ŝtatoj povas sendepende regadi, sed kiuj pro la reciproka dependeco kaj similaj celoj devas estis simile aranĝataj. Estas jenaj : komerco precipe limimpostoj. 2, leĝoj pri nedirektaj impostoj, 3, numologio, 4, leĝoj militaj, 5, aferoj fervojaj koncernantaj ambaŭ duonojn imperiajn, 6, ŝtata banko bun privilegio eldoni banknotojn. La reciprokaj kontraktoj de reprezentantoj de ambaŭ ŝtatoj pri la aferoj kondiĉe komunaj estas verkataj por difinita daŭro, Tiel okazis en jaroj 1867, 1877, 1887 ĉiam por daŭro de dek jaroj kaj post 1897 dum konstantaj malfacilaĵoj parlamentaj kontrakto estis sinsekve daŭrigita ĝis 1907. Tiun ĉi jaron oni nepre devas renovigi la kontrakton kaj fondi fundamenton de reciprokaj komercaj rilatoj. Sed nun estas tute aliaj kondiĉoj ol en 1887 ; la cirkonstancoj tiel ŝanĝiĝis, ke dum konsiladoj de ministratroj de Beck (aŭstra) kaj de Wekerle (hungara) la problemo ne sole estis, kian kontrakton fari, sed oni dubis, ĉu oni entute faros ian kontrakton, ĉar forflugis jam tempoj, kiam kondukantaj hungaraj politikistoj staris sur fundamento de ekonomia unuiĝo kun Aŭstrujo. Ceakanoj mortis kaj en Hungarujo politika devizo fariĝis : disiĝo de Aŭstrujo. Tiu fino de dualismo tute nemirigas, ĉar ekonomiaj interesoj de Aŭstrujo kaj Hungarujo estas nun tro malsamaj. Hungarujo estas ŝtato precipe terkultura, sed Aŭstrujo jam komencis estis ŝtato precipe industria. Tial limimposta disiĝo estas „ la komprenebla " celo de hungara politiko. Kontraŭ tiuj ideaj malhelpoj sukcesis al Beck kaj Werckerle ellabori la kantrakton. Kritiki artikolojn de tiel komplikita kontrakto, estas ne facila laboro. Tio estas devo de la parlamentoj, sed ĝis nun ili diskutas pri ĉio ajn, nur ne pri komercaj profitoj aŭ malprofitoj de la kontrakto. Pri diversaj detaloj de la kontrakto kaj ĝiaj sekvoj precipe pri la duoniĝo de ŝtata banko, mi parolos pli poste en en aparta artikolo. El diritaj vortoj oni jam vidas, kiel la situacio estas komplikita ĉe mi ; sed ĝin ankoraŭ komplikigas la naciaj demandoj, precipe « ĉeĥaj postuloj » (dua ĉeĥa universitato en Brno, kaj postulo, ke ĉeĥa lingvo estu uzata inter ŝtataj oficoj en Bohemujo, Moravio kaj Silesio ankaŭ dum interna agado). Ĉar Beck ne volis plenumi la postulojn, la ĉeĥaj deputatoj balotos kontraŭ la kontrakto, obeante konsilojn de ĉeĥaj nacionalistaj jurnaloj, ne pro kaŭzoj ekonomiaj, sed naciaj. Simile germanaj « kristanaj socialistoj » balotos por kontrakto, ree ne dro ĝia efektiva enhavo, sed ĉar ili ĉiam estas fidelaj aŭstraj patriotoj. Do seriozeco de la nova popola parlamento ne ŝajnas tre granda, kaj la politika situacio de Aŭstra duono tre brila. Krom tio la tuta konstitucia fundamento de la imperio estas malfirma. « Monarĥio aŭ imperio aŭstro-hungara» (tiu ĉi titolo estis enkondukita per propra regista letero el 14 XI 1868, kies valoro kaj rajteco eĉ konstitucie, eĉ aŭtonomie estas tre dubindaj) ne havas ian komunan konstitucion kaj eĉ por estonteco estas tute nepoveble, verki similan skribdokumenton. La nuna formo dueca (dualisma) estas fondita per hungara leĝo en 1867 kaj per aŭstra leĝo 21 decembro 1867 pri komunaj aferoj, sed ambaŭ tiuj leĝoj estas leĝoj nur de la nomitaj imperiaj duonoj. Same kiel mankas unueca konstitucia deklaracio mankas ankaŭ ia difino de jurista fundamento de tiu-ĉi ŝtata formo. Estas dubo, ĉu la monarkio estas ŝtato societa, aŭ reala unuiĝo, aŭ nur unuiĝo persona. Cio-ĉi tre helpas hungaran celadon pro memstareco, precipe ekonomia, de hungara regno.

S. K.

Hispanujo.

Barcelono, Novembro 1907.

Vere, la sorto ne favoris la hispanoju. Post la superakvoj en la Andaluzia regiono la katalanaj provincoj estis, en multaj lokoj, superakvigitaj per la riveroj kies fluoj superiĝis 5 aŭ 6 metrojn super la ordinara nivelo. En la Malaga provinco, precipe la perdoj estis grandaj, La fluoj, forbordiĝinte, forportis pontojn, relojn, arbojn, bestojn ĉiuspecajn malstarigis domojn, kies loĝintoj multenombraj perdis la tutan meblaron, eĉ multaj el ili droniĝis.

La komercistoj multe perdis. La forbordiĝintaj akvoj kunmiksiĝis kun la pulvo, formante koton, kiu plenigis la stratojn emirante la domojn malbeligante kaj malbonigante la komercaĵojn. Kompreneble, tiuj, kiuj, ankaŭ multe perdis estas la terkulturistoj. La tutajn produktaĵojn de la jaro la fluoj forportis el ili, Post tiom da malfeliĉaĵoj, okazintaj en la Andaluziaj provincioj, la katalunaj estis ruinigitaj, en multaj lokoj, per teruraj superakvoj kiuj malstarigis fabrikejojn, domojn ferajn, lignajn kaj ŝtonajn pontojn, La reloj estis detruitaj je multaj metromiloj, kio devigis la vagonarojn haltigi la ordinaran moviĝon. Multaj vagonoj kiuj estis apud la rivero en la Manresa urbo, estis forportataj kaj detruataj. Sciante tiujn malfeliĉaĵojn, la provincestroj, urbestroj, marprovincestroj k. c. penis helpi la superakvigitojn sendante akvopumpilojn, barkojn kaj manĝaĵojn.

La societoj, politikaj, sportaj, bonfarantaj k. c. organizis almozokolektojn inter siaj societanoj kaj publike. La jurnaloj same faris inter siaj abonintoj. Multaj firmoj ankaŭ same faris. La provinca deputataro, la urbaj konsilantaroj kaj la ŝtato sendis monon por helpi la superakvigitojn. Sed, tiuj laŭdindaj helpoj ne sufiĉas. La perdoj konsistas el milionoj da pesetoj. La terkulturistoj, la laboristoj estas senlabaraj, sekve, sensalajraj. Kiel ilin helpi ? La rekonstruado de la fabrikejoj daŭros longe ; alie, multaj fabrikistoj ruiniĝis tute aŭ preskaŭ tute. Estas, do, necese ankaŭ ilin helpi. Kiel ? Oni sin demandas. Jen la grava problemo kies solvo atendiĝos. La kampoj estas, nun, nur maraĉoj Kiel ilin plugi ? Post superakvoj en Katalunlando, la reĝo decidis viziti la provincojn superakvigitajn. Li, do, akompanata de la ministrarestro, envagoniĝis Malagon, ĝin vizitis, kiel ankaŭ ĝian ĉirkaŭaĵon kaj enŝipiĝis por Barcelono. Li alvenis preskaŭ vespere kaj la sekvantan matenon li forlasis nian urbon por viziti la superakvigitajn urbojn. La vizito estis tre rapida. Tamen oni multe petis kaj oni multe promesis. La popolo petis per siaj reprezentantoj kaj la ŝtato promesis per siaj.La reĝo monhelpis la akvigitojn kaj promesis sin okupi por solvigi la problemon, kiun prezentas la superakvoj Poste li reiris Madridon. Esperante la realiĝon de la promesoj la vintro sin prezentas : malvarma, sen laboro por la laboristoj, sen pano por iliaj filoj, kun la malĝojeco en ilia koro, kiun, nek ĉe la afabla reĝa vizito povis elkorigi.

A. PIERRE.

Svisujo

Berno, Novembro 1907.

La ĉefa demando, kiu, en la lasta tempo, priokupadis tutan Svisujon, estis la nova leĝo pri la organizo de la armeo. Jam diversfoje, kaj nome en 1895, la demando esti metita antaŭ la popolo, sed ĉar de tiuj projektoj rezultis pli gravag ŝarĝoj materialaj kaj pli granda centraligo, ili ĝis nun estis rifuzitaj. La jusa leĝo havis pli favoran sorton. La Parlamento ĝin akceptis preskaŭ unuvoĉe, eĉ la malmultaj socialistaj reprezentantoj ĝin aprobis. Laŭ tiu ĉi leĝo, la daŭro de la militservo estas iom ŝanĝita kaj pligrandigita. Oni scias, ke Svisujo ne havas konstantan armeon, sed nur « milican » armeon. De la 20a ĝis la 32a jaro, la soldato apartenas al la unua parto de l'armeo ; ĉiujare aŭ ĉiuduj are, li estas vokata por servo de kelkaj tagoj aŭ por simpla inspektado. De la 32a ĝis la 40a jaro, li apartenas al la dua parto aŭ « Landvehr » sed estas de tempo al tempo vokata por inspektado aŭ pafadekzerco. Post la 40a ĝis la 55a li estas envicigata en la « Landsturm », sed estas fakte liberigata de ĉiu servo. La regnanoj kiuj ne estas soldatoj, pagas laŭrentan militan imposton. La jus akceptita leĝo ne ŝanĝas la principojn de tiu organizo. Ĝi reguligas kelkajn malordojn kaj konfuzaĵojn en la ĝisnuna leĝaro, precizigas la kompetentecon de la Konfederacio kaj de la kantonoj, kaj ĉefe aliformigas la tempon de l'militservo, kiu

estos koncentrata dum la junecaj jaroj, tiel ke je la 27ª jaro, la soldato estas preskaŭ liberigita, sed aliparte la tempo de l'instruada periodo estas plilongigita je ĉirkaŭ 20 tagoj; entute la militservo de 20ª ĝis 32ª jaro daŭros proksimume 120 tagojn (20 pli ol laŭ la malnova leĝo); tiu pligrandigo (verdire tre mallonga, se oni ĝin komparas kun la daŭro de l'militservo en la aliaj) estis decidata por ebligi pli bonan militan instruadon de la rekruto, ne sufiĉan per la antaŭa tempo. La dirita leĝo estis tuj atakita de la socialista gazetaro, ĉar ĝi sekvigas pligrandiĝon de l'milita budĝeto kaj pligraviĝon de l'soldataj ŝarĝoj. La « referendumo », iniciatita de la socialista partio (malgraŭ kelkaj el ĝiaj ĉefoj) kunigis pli ol 80.000 subskriboj. Oni scias, ke, en nia lando, ĉiu leĝo akceptata de la Parlamento estas metata al la voĉdono de l'tuta popolo, se en la daŭro de tri monatoj almenaŭ 35.000 regnanoj tion postulas. La supredíritaj 80,000 subskriboj ne estis liveritaj nur de socialistoj (en Svisujo, ili krom en ia grandaj urboj, estas tute ne multaj), sed ankaŭ de ĉiuj regnanoj, kiuj kontraŭstaras al la nenecesa pligrandigo de l'armeaj elspezoj. La batalado estis tre akra kaj tre vigla. En ĉiuj lokoj, estis organizitaj grandaj popolaj kunvenoj ĉefe por la leĝo. Ekster la socialista partio, ĉiuj aliaj partioj varmege rekomendis la akcepton de la nova leĝo; nur la radikaloj de Genevo kaj kelkaj tre malgrandaj katolikaj rondoj rekomendis nee voĉdoni. Preskaŭ ĉiuj ne socialistaj gazetoj bataladis por la leĝo kaj alvokis al la patriotismo de la Svisoj por ke ili jese voĉdonu; plie oni agitis la fortimigilon de l'antimilitarismo kaj la minacon de ebla milito inter la potencaj najbaroj de Svisujo. La kontraŭuloj de la leĝo argumentis. ke la Svisa armeo en sia nuna formo tute taŭgas por sia celo, ke la leĝo estas antidemokratia kaj kostos multe da mono, ĝuste en la momento kiam la kosto de l'vivado ĉie plikariĝas. La voĉdonado okazis la 4ªⁿ de novembro. La nombro de la voĉdonintoj estis la plej granda ĝis nun atingita (592.000 inter 785.000 enskribitoj). Kiel antaŭvidite, la leĝo estis akceptita, sed per malgranda plimulto (325-237 jesoj kontraŭ 263, 463 neoj); 14 ŝtatoj ĝin akceptis kaj ĝin malakceptis. Preskaŭ ĉiuj franclingvaj kantonoj ĝin malakceptis, ankaŭ la katolikaj kantonoj, fondintoj de la Konfederatio, kiujn oni certe ne povas kulpigi pri socialismo; eĉ en la radikalaj kaj centraligemaj kantonoj kiel Bern, la nombro de la neoj estis tre granda kaj estis ĉefe liveritaj de la kamparanoj. La ĝojo de la partianoj de la leĝo estis granda, ĉar ĉiam estas danĝere submeti al la popolo ian leĝon, kiu iom pligrandigas la materialajn ŝarĝojn de ĉiu. sed aliflanke ĝiaj kontraŭuloj ne malpli ĝojas, ĉar la nombro de la neoj estis neatendite granda; ĉiaokaze, ĝi klare montras, ke la Svisa popolo ja volas fari oferojn por havi bonan nacian armeon, sed ĝis certa grado, kiun la Parlamento ne devos preterpasi ekster la saĝaj limoj.

Unuigitaj Ŝtatoj

Seattle, Wash. Oktobro 1907.

Kvankam Unuigitaj ŝtatoj dum la lastaj jaroj, ĝuadis longan periodon de tiel nomata « prospereco », la nuna situacio evidente ne estas plej bona. Dum kelkaj jaroj la stalfabrika afero, kiu estas ĝenerale rigardata kiel barometro pri la komercaj aferoj de la lando, ricevis grandan « boom ». (antaŭenpuŝon). La fabrikejoj havis tiom da mendoj ke ili ne povis ilin plenumi, almenaŭ multe da prokrasto okazis, speciale pri la ferreloj kaj domkonstruaĵoj. Sekve, la « Steel Trust », (staltrusto), kiu kontrolas absolute la industrion en nia lando, tre altigis la prezojn, kaj pagis al siaj akciuloj preskaŭ nekompreneblajn dividendojn. Same okazis en multaj aliaj trustoj, ekzemple la kupra, kaŭĉuka, vitra, telegrafa, fervoja, kaj aliaj. Oni nedube scias ke en tiu ĉi lando la trustoj estas la ĉefaj aferoj. Ili kontrolas ĉion uzatan de la homoj, de la lulilo ĝis la tombo. Iom post iom la malgrandaj fabrikistoj ĉiuspecaj malaperas, kaj same estas kun la magazenistoj. La grandegaj fakaj magazenoj en la urboj ĉiam pligrandiĝas, kaj por ĉiu tia kiu aperas, samtempe malaperas kelkaj centoj da malgrandaj. Unu el tiaj magazenegoj ofte kontraktas por ĉiuj fabrikaĵoj de ne nur unu fabrikejo, sed de centoj. En la centro de Chicago, ekzemple, troviĝas kelkaj tiaj magazenoj, la ĉefa el kiuj estas tiu nomata « Marshall Field's ». Tiu komercisto antaŭ ne longe mortis, lasante riĉecon da ĉirkaŭ 175.000.000 (Sm. 350.000.000). Sed la afero daŭras funkciadi same kiel antaŭe, kaj oni povas antaŭvidi la tempon kiam ekzistos en tiu urbo, same kiel aliloke, nur kelke da magazenoj, — sen iaj malgrandaj, krom tiuj funkciataj en diversaj partoj de la lando de la trustoj mem. La cigara trusto estas unu el tiaj, kaj ĝi kontrolas pli ol mil butikojn en preskaŭ ĉiu urbo en Unuigitaj Statoj. Kompreneble la « Cigar Trust » estas parto de la pli granda « Tobacco Trust », kaj tiu intencas kontroli la tutan tabakan aferon tie ĉi. Tamen kiel mi diris, ŝajnas kvazaŭ la fino de la longa periodo de prospereco estas videbla. La staltrusto, plenuminte siajn malnovajn mendojn, nun havas malmultajn pli, kaj la grandegaj kupraj minejoj apartenantaj al la kupra trusto en Butte, Montana, ĉesis funkciadi, ĉar la kvanto da tiu metalo tiel grandiĝis ke la trusto, timante ke la prezo malaltiĝus, preferas ĉesigi la funkciadon de la minejoj plivole ol permesi tion. Ciuj signoj montras ke ni proksimiĝas gravan krizon, en la historio de la lando. Oni ne povas diri ĝuste kiam tio okazos, ĉar ĝi dependas de multaj diversaj faktoj. Se eble, la bankieroj kaj regnestraro prokrastos la krizon ĝis post la proksima prezidanta elektado en 1908, ĉar se ĝi alvenus pri frue eble la partio « republican » estu ventika je la balotado.

Unu el la plej gravaj simptomoj de la alvenanta krizo estas la striko de la telegrafistoj, kiu okazis antaŭ du monatoj. Malsame de la kutimo en ĉiu alia lando sur la terglobo, en Unuigitaj Statoj la telegrafo estas privata afero, kiun posedas nur malmultaj familioj. Ekzistas du kompanioj, nomataj „ Western Union " kaj „ Postal ". La unua apartenas plimulte al la familio Gould, dum lastan posedas la familio Macka. Kompreneble kelkaj akcioj estas posedataj de aliaj, sed la nomitaj personoj havas plenan kontrolon. Oni povas diri, ke la plano de la kompanioj, dum multaj jaroj, estas malplialtigi la salajrojn de la telegrafistoj kaj samtempe plialtigi la koston de la servo al la publiko; ili devas havi grandan sperton kaj lertecon, por ke li povu senerare kaj rapid transigi la milionojn da depeŝoj ĉiumonate sendatajn, Antaŭ dek jaroj la kompanioj, elpensis novan planon, kiu estas konata sub la nomo „ bonus system " (Liberdonaca sistemo). Laŭ tiu la telegrafistoj ricevas unu cendon aldone al siaj salajroj por ĉiu depeŝo transigita hore, super la nombre dudekkvin, aŭ kelkafoje tridek. Se la laboristo ricevas kvardek cendojn ĉiuhore kiel regulan salajron, kaj transigas kvindek depeŝojn en tiu tempo, li ricevas pro tio 65 cendojn por tiu horo, kaj se li povas daŭrigi sian rapidecon dum plenaj naŭ horoj oni komprenas ke la ricevo estas materiale plialtigata. Tamen, por gajni tian plialtigajon la telegrafistoj kutimas oferi la akuratecon, sciante ke la kompanioj ĉiam batalas forte kontraŭ iaj postuloj pro difektaĵoj kaj tre malofte pagas ion. La rapideco, kiun oni postulas de la ofistoj baldaŭ ruinigas la sanon de multaj, kaj forpelas aliajn el le afero, proponaas nenion al la daŭrigantoj krom la fina forjeteco en la straton post longa laborado por la patronoj, kaj al la publiko prezentas nenion krom altaj prezoj, malrapideco en la servo kaj direktoj en la depeŝoj mem. Post la ekstriko, la servo estas pli malbona ol iam antaŭe, kaj la kompanioj kutimas uzi la poŝton anstataŭ la telegrafon, malgraŭ ke oni ĉiam postulas la regulan telegrafprezon. Cu oni pensas ke tiaj cirkonstancoj plaĉas al la grandaj komercaj firmoj de la lando, aŭ al la ordinaraj uzantoj? Certe ne. Tamen en nia lando la telegrafo ne funkciadas por okdek milionoj da loĝantoj sed por la profito de la du Gould kaj Mackay familioj. La publiko ne havas rimedon, ĉar la du kompanioj, per kontraktoj kun ĉiuj la fervojaj kompanioj, kaj interrilatoj kun la plej grandaj trustoj ĉieaj, kontrolas ĉion. Ni prezidanto, kiu dum sia tuta periodo en „ White Housə ", laŭte parolis pri la neceseco limigi la potencon de la trustoj, ne povas agi por la telegrafistoj, kies striko verŝajne malsukcesos.

Ni aŭdas multe pri la ebleco de milito kun Japanujo nuntempe, speciale de la Pacifika mabordo. La kolonoj de la ĉiutagaj jurnaloj ofte enhavas artikolojn, pritraktas tiun ĉi eblecon, kaj multaj el niaj landanoj timas ke la milito efektiviĝos. Unuigitaj Statoj estas la plej grava produktanta lando sub la ĉielo, kaj la prospereco de la fabrikantaj kaj komercaj klasoj, dependas tute de la daŭrado de la « foreign market » (fremda aĉetado). Tial ke la laboristaj klasoj ricevas nur malgrandan parton de siaj produktaĵoj kiel salajroj, necesas do ke oni trovu fremdajn aĉetantojn por almenaŭ triono el niaj fabrikaĵoj kaj nutraĵoj ĉiujare; ĉar ni ne povas trovi tiajn en nia propra lando ni estas devigataj serĉi aliloke. Pro tio ni okupis la Hawaiian kaj Philippine insularojn, kaj deziras havi la « malfermitan pordon » al tuta Azio. Sed Japanujo nun eniras la vicojn de la grandaj produktaj nacioj, kaj pro sia geografia situacio deziras teni por si la kontrolon de tiu kontinento por ke ĝi povu disponi siajn produktaĵojn senĝene de Unuigitaj Statoj aŭ alia lando. Pro tio Japanujo faris militon kontraŭ Rusujo, pro tio ĝi formis interligon kun Anglujo; pro tio ĝi konstante pligrandigas sian ŝiparon kaj militistaron; pro tio ĝi komencos, se necese, militon kontraŭ Unuigitaj Statoj, milito por kiu multaj kapitalistoj entuziasme partoprenus ne en sia propraj personoj, kompreneble. Tamen, ne estos milito inter la du nacioj, almenaŭ baldaŭ; Japanujo kvankam granda militema lando, ne estas sufiĉe riĉa por sukcese militi, kontraŭ Unuigitaj Statoj, kaj la lasta, kvankam neniam preta por ia milito, certe venkus, post sufiĉe da tempo, sed la eventualeco de tia milito estas uzata por instigi al la konstruo de militŝipoj, kaj grandaj fortikaĵoj ĉe ĉiu Pacifika urbo, ktp.

Charles E. Randall.

Ni ricevis el nia korespondanto el Unuigitaj Statoj respondon al la artikolo de S-ro Fessendrie publikigita en nº 17; ni ĝin enpresos en nia veuonta Nº. Ni uzas la okazon por diri, ke, kvankam penante por ke niaj naciaj korespondaĵoj estu plej senpartiaj kaj objektivaj, ni ne povas plene respondi pri la ĝusteco aŭ neĝusteco de la asertoj de niaj korespondantoj — kio estus afero tute neebla sed volonte akceptas respondojn de niaj legantoj, se ili opinias, ke tia aŭ alia fakto en artikolo estis ne ĝuste priskribita.

(*Red.*)

Tutmonda Kroniko

16 oktobro, Hago. — Subskribo de arbitracia traktato inter Meksikujo kaj Italujo.

Parizo. — Mortas astronomiisto Lœvy, direktoro de la Observatorio.

77, Sidney (Kanado). — Marconi malfermas la raditelegrafan servon inter Eŭropo kaj Ameriko.

18, Hago. — Fermo de la Paca konferenco.

20, Berlino. — Malfermo de la nacia kongreso de la societoj de la Kristanaj laboristoj.

21, Casablanca. — Batalo inter francoj kaj Marokoj; mortas kapitano Ihler.

Turkestanlando. — Ŝtonfalado pro tertremo ruinas la urbon Karatag.

23, Tonlon. — Aresto de la maristara oficiro Ulmo pro spionado.

Sud-Italujo. — Terura tertremo; multaj mortintoj kaj kunditaj.

23-29, Berlino. — Proceso de generalo Von Moltke kontraŭ la jurnalisto Harden, kiu estas absolvita.

24, Bruselo. — Internacia konferenco kontraŭ la negocado de la blankulinoj.

27, Csernovo (Hungarujo). — Sanga konflikto inter la slovakoj kaj policano.

Norda Italujo. — Superakvoj en Lombardio kaj Vevetio.

29, Tirenzo. — Princidino Monica, filino de la reĝo de Saksujo, estas liverata al la patro.

Londono. — Alveturo de la Hispanoj gereĝoj.

ESPERANTO PRAKTIKA

DELEGITARO POR LA ALPRENO de LINGVO INTERNACIA

Ni en la lasta nº de *Esperanto* informis niajn legantojn pri la kunveno de la komitato por la elekto de la Internacia Lingvo. La dirita komitato konsistis et la jenaj anoj: honora prezidants: P-ro Förster; efektiva prezidanto: Ostwald; sekretarioj: S-roj Coutural et Leau; anoj: S-roj P-ro Peano (Italujo), Lampros (Grekujo), Jespersen (Danujo), Baudoin de Courthenay (Rusujo), Hugon (Britujo), Mougeon (Belgujo), Boirac, D-ro Rodet (Francujo), S. Moch, L. de Beaufront (Esperantistaro). Tiu komitato decidis *akcepti la lingvon Esperanto* pro ĝia relativa perfekteco kaj ĝiaj jam multaj praktikaj aplikaĵoj, kun kelkaj modifoj kaj korektoj kiuj estas difinataj en la raporto de la sekretarioj. La decido de la Delegitaro estos baldaŭ oficiale konigata al la publiko kaj ni pli detale raportos pri ĝi, tiuj kiam ni posedos plenajn informojn.

KORESPONDAĴOJ

Beauno, oktobro 1907.

Estimata sinjoro,

En Nº 17 de *Esperanto* mi legis la rimarkon pri la opinio de «Teditulo», sed bon volu permesi al mi diri la jenon: Tre certe tiu, kiu anoncis per gazetanoncoj nepre devas respondi, sed estas necese ke la nomo de l'sendinto kaj lia adreso estu bone skribitaj! aliamaniere la kartoj revenus al la sendinto). Tio al mi jam pluraju fojojn okazis; tial, mi opinias, ke estus tre bone, ke ĉiuj personoj korespondantaj kiu estos tiamauzu kaŭĉukan stampilon por montri la adreson, niere legebla de ĉiuj.

Akceptu, k. t. p. J. Pion.

DIVERSAĴOJ

Komerco. — La Pariza Grupo publikigis sekvantan leteron, kies atentan legadon ni tre rekomendas al ĉiuj ne-francaj komercistoj:

« Estimata samideano! Ni opinias, ke alvenis la tempo por ĉiuj Esperantistoj uzi Esperanton en siaj internaciaj korespondado kaj interrilatoj, ĉar per tiu uzado ili mem ricevos ofte ne nur tre grandan profiton, sed ankaŭ faros tre fruktoportan kaj utilan servon al la disvastiĝo de nia kara lingvo. Gis nun oni povis timi, ke letero esperante skribita kaj sendita al ne-esperantisto, estos nekomprenata de la adresato pro tio ke li eble konas nek nian lingvon, nek Esperantiston, kiu povos traduki al li la enhavon. Sed en la lastaj jaroj la Esperantistoj fariĝis pli kaj pli multenombraj kaj tio ebligis al la Komerca Sekcio de la Esperantista Pariza Grupo starigi en tuta Francujo vastan organizadon de letertradukado, kies funkciadon ni klarigas ĉi malsupre. Ni tre instigas vin diskonigi ĉi tiun organizadon al la membroj de via Grupo aŭ Societo, ĉu per sendo de apartaj cirkuleroj, ĉu per disdonado de la sekvanta listo de la franca tradukistaro. Notu bone la jenajn rekomendojn pri la funkciado de tiu letertradukado. Kiam ne-franca Esperantisto volos korespondadi Esperante kun iu ajn persono loĝanta en Frankujo, kiu ne konas mem Esperanton, li devas unue certiĝi en kiu departemento kuŝas la urbo de la adresato (departemento estas generale skribita post nomo de urbo), Ekz: Paris (Seine), Marseille (Bouches-du-Rhône), Boulogne (Pas-de-Calais). Poste li devos serĉi sur la listo de franca tradukistaro tiun departementon kaj kopii sur unu tradukigilo, la nomon kaj adreson kiuj estas skribitaj post la nomo de tiu departemento, kaj enmeti la tradukigilon en la koverton samtempe kun sia letero. Por tiu letertradukado, la adresato devos pagi al la tradukanto 50 centimojn per poŝtmarkoj. Pro tio, ke la poŝtmarkoj de ĉiuj landoj estos akceptataj, la adresanto, kiam li volos ŝparigi tiun elspezon al sia korespondanto, povos enmeti en la leteron poŝtmarkojn de sia lando. 50 centimoj = 40 pfenigoj = 5 pencoj (= 20 Sd.) »

Al komercistoj, kiuj tion deziras, estas sendata a l'reso de pli ol 80 tradukistoj (unu aŭ du por ĉiu franca departemento) jena franca tradukigilo:

« *Monsieur. N'ayant pas l'avantage de connaître la langue française, je prends la liberte de vous écrire en Esperanto. Pour faire traduire la lettre ci-jointe, Il vous suffira de l'envoyer à l'adresse ci-dessous en joignant 0 fr. 50 en timbres-postes français ou étrangers. Adresse du Traducteur. (Adreso de la Tradukonto).* »

Por ĉiaj sciigoj sin turni al la Komerca kaj Industria Sekcio de la Grupo Pariza. Adreso: Eeperanto, 21, rue de l'Arbre Sec, Paris.

⁂

Esperantistujo. — Oni decidis dum la IIIª Kongreso la kreon de Esperantistujo, kie dum la libertempaj monatoj Esperantistoj ĉiulandaj sin renkontus, kiam ili volus, kaj tiel longe, kiel plaĉus alili. La kunvenintoj decidis, ke por la proksima jaro Esperantistujo estos starigita en vilaĝo kuŝanta en la lando, kie okazos la Kongreso (do en Germanujo) en la proksimeco de la kongresa urbo. Laŭ la cirkonstancoj kaj la ebloj, Esperantistujo naciaj povos esti organizataj. Jen la listo de la delegitoj, kiuj aranĝos la tutan aferon: *Anglujo:* Djra Sydney Whitaker, Waterloo, Liverpool. *Ameriko:* S-ro A. M Grillon, 6326, Vine Street, Philadelphia. U. S A *Francujo:* S-ino Baronino de Ménil, 46, boulevard Magenta, Paris; S-ro C. Aymonier, 16, rue Monge, Paris. *Germanujo:* S-ino Hankel, Nicolasistrasse 18, Dresden; S-ro Friedrich Carl Küchler, Wiesenhüttenplatz 30, Frankfurt a. M. *Hispanujo:* S-ro M. Esteban, San Juan, 48, Burgos; S-ro Johano Rozals, Corretjer, Portaferrissa 30, Barcelona. *Italujo:* S-ino Rosa Junck, Professoressa di lingue, Bordighera. *Polujo:* S-ino Jesfila Essigman, Marshalkowska, Varsovio; D-ro Wilhelm Rohin Senatorske, 30, Varsovio; S-ro N. P Evstifeieff. *Svisujo:* Pastro Schneeberger, Lüsslingen (Solothurn) La sekretario ĝenerala estas S-ro Sydney Whitaker Ciuj kiuj deziras ricevi informojn aŭ ion proponi, devas sin turni al sia nacia delegito. Pli precizajn detalojn oni donos pli malfrue; sed de nun oni akceptos volonte la aliĝon aŭ la proponojn de tiuj, kiuj aprobos la ideon kaj dankeme eĉ la plej malgrandajn monoferojn.

⁂

Bulgara Esperantistaro. — Bonaj novaĵoj venas al ni el Bulgarujo. La nacia Esperantista Kongreso, kiu okazis en Tirnovo la 18-19 an de Aŭgusto havis belegan sukceson kaj liveris bonajn rezultatojn por la propagando en Bulgarujo. Oni fondis Bulgaran Esperantistan Ligon, kies komitato estis jene elektita: Prezidanto honora, D-ro Zamenhof; prezidanto, S-ro Haralamkev; vicprezidanto, N. D Kovaĉef; sekretario, S-ro Dobruganski; anoj. S-roj Georgiev kaj Silvestriev. La gazeto « Lumo » estis elektita kiel oficiala organo. Ciuj Bulgaraj jurnaloj parolis pri tiu kongreso, kiu signifas fortan antaŭen puŝon de nia afero en Bulgarujo. L. S.

⁂

Esperanto oficejoj. —

Esp.-Oficejo. S-ro A. N. Vasiljev, *Voronej* (Rusujo); informado, maklerado, tradukoj, k. t. p. (por ĉia informo oni sendu 1 fr. poŝtmarke.

Esp.-Oficejo. — Liverpool. Berry Str.; afiŝejo, vendejo, k. t. p.

⁂

Gvidlibroj. — Sekve de nia artikolo en nº 16 de *Esperanto* ni ricevis multajn petojn de niaj legantoj kaj demandojn de konsuloj, kiuj intencas klopodi en tiu direkto. Je tiu okazo, oni prave rimarkigas, ke la gvidlibreto de Châlon-s-S. ne estas folio, sed vera libreto, eldonita de la Grupo.

⁂

Bohema Esperantistaro. — La Bohemaj Esperantistoj intencas fondi Union Esperantistan laŭ la modelo de la alilandaj naciaj societoj. Ili elektio preparan komitaton kaj oni esperas, ke la definitiva kreiĝo okazos antaŭ la fino de tiu jaro. (Adreso de l'Kanceiario: Bohema Unio. Praha II. Tyrsova ul. 11.

✶ ESPERANTO ✶

KONSULAJ INFORMOJ

Por respondi diversajn demandintojn, ni ĉi-sube klarigas la servojn, kiujn ni faras al la Esp. konsuloj kaj Oficoj, kiuj pagas monhelpan abonon da 10 fr. al ESPERANTO. 1º Ni presigas senpage iliajn adresojn ĉiunumere. 2º Ni presigas iliajn sciigojn (informojn pri ilia kreo, organizo, la servoj speciale faritaj de ili k. t. p. 3º Ni presigas la anoncojn de la personoj, kiuj petas la servojn de la Esp Of Ekzemple, se iu en Bourg deziras sendi siajn infanojn en anglan familion por ke ili pasigu tie sian libertempon, li povos si turni al la Esp-Of. en Bourg, kiu sendos al ni anoncon presotan en ESPERANTO. Poste ĉiuj anglaj Oficoj leginte ĝin afiŝos tiun anoncon kaj ĝin tradukos anglen, tiamaniere ke ĝi estu konata de ĉiuj. Se iu deziras korespondi aŭ rilati kun la fremdulo pri difinita temo, li bezonos nur sin turni al la konsulo aŭ Ofico de sia urbo. Se tiu konsulo estas monhelpanta abonanto de ESPERANTO, ni senpage presigos tiun anoncon, kiu, per la aliaj konsulejoj, estos konigata al ĉiuj intereseblulo Estas tre dezirinde, ke ĉiuj Esp-Of. kaj konsuloj aliĝu kaj profitu tiujn favorajn kondiĉojn. Iom post iom, nia jurnalo fariĝos la komuna organo de tiuj entreprenoj, kiuj ĝis nun ne povis sin konigi kaj utili kiel dezirinde, nur pro tio, ke ili ne havis ian komunan ligilon.

⁂

Liverpool. — En Liverpool, Fraŭlino Margaret L. Jones jus malfermis publikan Esperantan oficejon kaj lernejon. La estrino. F'ino Jones, ĉeestas ĉiutage, kaj, vespere, ĉiumarde kaj vendrede Oni povas sendi al la oficejo leterojn por senpagaj tradukoj. En la oficejo oni donos ĉiajn informojn pri Esperanto, pri kursoj, pri paroladoj kaj kunvenoj k.t.p. Tie ankaŭ oni vendas ĉiajn Esperantajn librojn kaj ricevas abonojn por gazetoj, k.t.p. En la lernejo oni instruas kurse la unuagradajn kaj altagradajn gelernantojn. La fremdaj Esperantistoj, en okazo de vizito al Liverpool, povos utiligi la oficejon iamaniere, sed oni invitas ĉiun Esperantiston uzi la oficejon kaj librejon kion eble plej multe, kiel ejon por la ĝenerala profito de samideanoj. Tie oni povas skribi leterojn, legi la jurnalojn, renkontiĝi kun amiko, k.t.p. Por plua informo skribu al F'ino Margaret L. Jones, vic-prezidanto de la Esperanta Grupo de Liverpool kaj nova konsulo por Liverpool. Adreso: — The Esperanto Schoo & Office, 7, Berry Street, Liverpool

Reims (Francujo). — Esperanto-Ofico, 5, place Royale (telefono 436), Chauvillon, libristo, konsulo. Liveras ĉiujn informojn, parole kaj letere, pri Reims kaj la regiono: turismo, komerco kaj esperantismo. Ricevas ĉiujn leterojn por la grupo esperantista de Reims (S. f. p. E.).

Roanne (Francujo). — Konsulo: S-ro Fortier-Beaulieu, 6, rue des Tanneries.

Romo (Italujo). — Esp-Konsulejo, Fotografia Dottarelli, 29 via Belsiana.

Roubaix (Francujo). — Konsulo: A. Denis, 86, rue du Moulin-Roubaix.

Seattle (Wash. Unuigitaj Statoj). — Esperanta Konsulejo, S-ro Ch.-E. Randall, zorgas pri ĉiaj aferoj, komercaj, sociaj, k. c. en Seattle kaj la Pacifika marbordo por la Esperantistaro.

St-Etienne (Francujo). — Esperanto-Konsulejo. — Taverne Alsacienne, place Marengo. nia lingvo estis akceptita de la progresemaj direktoroj. La graveco de la firmo pligrandigas la bonan efikon de tiu inteligenta decido. Multaj komercistoj imitu tiun bonegan ekzemplon.

Stockholm (Svedujo). — Esperanto-Oficejo 37, Surbrunnsgatan IV. Direktoro: S-ro P. Ahlberg. La Oficejo celas servi al Esperantistoj kaj neesperantistoj kaj okupiĝos ekskluzive pri praktikaj aferoj; ĝi klopodos por: ¹) helpi fremdulojn venantajn al Stockholm; ²) peradi al industriistoj, komercistoj, hotelistoj, turistoj, kolektistoj, k. a., internaciajn rilatojn utilajn; ³) entute servi al la personoj, kiuj deziros uzi Esperanton por sia utilo. Por plenumi sian taskon, ĝi uzas la gazetojn *Esperanto* kaj *Esperantisten*, prospektojn, k. t. p, ĝi kolektos kaj disponebligos al la klientoj esperante skribitajn prezarojn, reklamilojn, gvidlibrojn, k. t. p, prizorgos tradukojn sveden kaj esperanten, k. c. La oficejo ne prenas sur sin la poŝtajn elspezojn.

Valence (Francujo). — Konsulo: J. Delfour-kolegiestro.

Vesoul (Hte-Saône, Francujo). — Konsulo; S-ro Maurice Girardet, negocisto, 1, rue de la Gare.

ANONCETOJ

Kosto. 8 spesdekoj (20 centimoj, 2 pencoj, 10 pfenigoj) por ĉiu linio.

Rabato de 25 % por 6 enpresoj.

Niaj abonantoj rajtos enpresigi 3 liniojn unufoje senpage.

Oni sendu al ni la anoncetojn antaŭ la 5 kaj 20 de ĉiu monato, aldonante la monon. Poŝtmarkoj estas akceptataj. Oni skribu plej legeble.

London (Anglujo). — H. T. Bailey, 31, Caversham Road, Kentish Town, deziras aĉeti: *La Esperantisto*, 1889 ĝis 1895, jarkolektojn aŭ eĉ apartajn numerojn. Ankaŭ *Lingvo Internacia*, jarkolektojn nebinditajn, 1897, 1899. Ankaŭ deziras ricevi po unu ekzemplero de sekvantaj: *Espérantiste Canadien, La Stenografiisto, L'Esperanto*, (Nurnberg, 1889), *Mondlingvisto, Muviĥena Esperantisto* Ciu Grupo kiu eldonos novan gazeton estas petata sendi sciigon. *NE* deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilus.

Davos-Platz (Svisujo). — F-ino Herzog, lingvoinstruistino, volonte kaj danke akceptus malnovajn Esp. jurnalojn el ĉiuj landoj kiel propagandilojn kaj ĉiam estas preta por doni kiajn ajn informojn pri Davos kiel kuracejo kaj sportloko; plue invitas ĉiujn gesamideanojn, kiuj vizitos Davos'on partopreni en la internaciaj kunvenoj de la Esperantista societo. Adreso: Zur Heimat apud poŝtoficejo, *Davos-Platz.*

Basel (Svisujo). — S-ro A. Bader, Frobenstrasse 56, deziras korespondi letere kun ĉiulandaj samideanoj por interŝanĝi poŝtmarkojn. Ĉiam respondos.

Smirice n/L. (Aŭstrujo). — F-ino Adda Peŝakova, sukerfabriko, deziras interŝanĝi il. kartojn kun ĉiuj gealilandanoj; ĉiam kaj tuj respondos.

Halle a/S. (Germanujo). — S-ro S. Schad, instruisto, 3 Sudstrasse, deziras korespondi kun fremdaj gesamideanoj; ĉiam respondos.

Alger (Francujo). — S-ro Busquet, 8, rue Montaigne, deziras korespondi kun fremdaj gesamideanoj pri historiaj demandoj kaj nacia vivo.

Zurich (Svisujo). — S-ro Karl Maurer, Neptunstr. 10, deziras interŝanĝi vidaĵojn kun alilandaj gesamideanoj; ĉiam respondos.

Sabadell (Hispanujo). — « *Esperanta Semo* » tuj korespondos kun ĉiuj Esperantistaj fremduloj.

Troyes (Aube-Francujo). — S-ro G. Jüng, 14, rue de la Guérarde, interŝanĝas poŝtkartojn; nepre respondos.

Blois (Francujo). — S-ro kaj S-ino Raoul Oury, volonte korespondos kun samideanaj geedzoj, celante interŝanĝon de ideoj, reciprokan simpatian konatiĝon kaj, pli malfrue reciprokan senpagan hejman viziton.

Voiron (Isère-Francujo). — F-ino Jullien multe deziras interŝanĝi vidajkartojn koloritajn.

Aarau (Svisujo). — F-ino B Bœlsterli, Bachstrasse 1108, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj.

St-Polten (Aŭstrujo). — S-ro Karlo Fuchs, 38 Wienerstrasse, deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj per memfaritaj fotografaĵoj prezentante personojn kaj belajn pejzaĝojn.

Toyá (Barcelona-Hispanujo). — S-ro Barrera, farmaciisto, deziras korespondi kun samideanoj ŝatantaj ĉiuspecajn Kagenmetitajn birdetojn, speciale neeŭropajn, pri iliaj movoj kaj nutrado

Clermont-Ferrand (Francujo). — S-ro Robert Pillaulf, 10, rue Neuve, deziras korespondi poŝtkarte aŭ letere kun alilandaj gesamideanoj; tuj kaj ĉiam respondos.

St-Polten (Aŭstrujo). — S-ro Lud. Koller korespondas kun eksterlandaj gesamideanoj.

Zürich (Svisujo). — Samideana Germana junulo, dudekjara, *serĉas por tuj dungajon en oficejo, komercejo, k. t. p.* por perfektigi sin pri la Franca lingvo. Nun okupata ĉe advokata oficejo, en Zuriho Rapideco en Germana *stenografio* kaj *skribmaŝino*, konoj pri librotenado, paroletas la Francan lingvon. Bonaj atestoj kaj malaltaj kondiĉoj. Skribi al Karlo Stehle, Bahnhofstr. 106, Zuriho.

London (Anglujo). — S-ro Geo Bazile, 19, Lupus-Str, Pimlico (S. W), deziras korespondi kun Amerikaj kaj Aziaj junaj samideaninoj. (Ilustritaj hoŝtkartoj aŭ leteroj).

Praha (Aŭstrujo). — S-ro P. Havelka, Platnérŝk'a 87, deziras interŝanĝi vidaĵojn kun alilandaj gesamideanoj; ĉiam respondos.

Rotterdamo (Holando). — S-ro G. Allard, direktoro de Granda Hotelo ,,oomano, Hoofsteeg 12/22, deziras korespondi kun alilandanoj.

La Garenne-Colombes (Seine, Francujo). — S-ro Ernest Brançon, 30 bis, rue de Sartoris, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun Esperantistoj de la tuta mondo, esceptinte Francojn; ĉiam respondos.

Barcelono (Hispanujo). — S-ro F. Martinez, Pasco de l Triunfo, 89 (Pueblo-mevo) deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun alilandanoj.

Douai (Francujo). — S-ro Henri Coppin, 3, rue François-Cuvelle, deziras korespondad per ilustritaj poŝtkartoj kun esperantistoj el ĉiuj landoj.

Manlleu (Katalunujo-Hispanujo). — S-roj J. Viladomat, muzikisto; J. Grive, pentristo; kaj L. Coll Espadaler, desegnisto, multe deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

Beaune (Côte d'Or-Frankujo). — Sendu 80 Spesdekojn al S-ro J. Pion, Société Générale, kaj vi ricevos *belan kolekton da 13 ilustritaj poŝtcartoj esperantistaj de Beaune*; tiu karto estos afrankata sur la flanko vidaja.

Sabadell (Barcelona-Hispanujo). — S-ro J. Gueralt, strato Garcia, 46, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtcartojn kun fremdaj Esperantistoj.

Sabadell (Barcelona-Hispanujo). — S-ro J. Tatcher, pastro, strato Campmany, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kum fremdaj Esperantistoj.

Saratov (Rusujo). — S-ro Georgi Davidov, *insiste petas la sekretariojn de Esperantistaj grupoj en ĉiuj landoj sendadi al li la regalarojn de la grupoj.*

Keighley (Anglujo). — S-ro J. Rhodes petas pardonon de multaj estimataj korespondantoj pro tio, ke, pro laboroj je la pli granda Angla-Esperanta vortaro, li nur povas nuntempe respondi la plej urĝajn leterojn.

Goole (Yorkshire-Anglujo). — S-ro Mollay, Custon House, deziras interŝanĝi poŝtajn kaj fiskalajn markojn; nepre respondos.

Esperanto-Eldonejo. — Karl Jost, Fröhlichstr, 40, *Zürich V-(Svisujo).* Al ĉiuj gesamperantistoj, estas rekomendataj la jenaj broŝuroj:

Esperantista Kantaro. 13 kantoj originalaj aŭ esperantigitaj por 4 voĉoj miksitaj, kolektitaj de Karl Jost. Prezo: 1 fr. (40 Sd).

Memoraĵo de la dua Universala Kongreso de de Esperanto, de K. Jost (unua broŝuro antialkohola). 20 cent. (8 Sd).

Lehrbruch der Esperanto Sprache, de A. Nötzli. fr. 1 (40 Sd).

La Kaprino de S-ro Seguin, tradukis A. Yersin. 15 cent (6 Sd).

Propagandaj poŝtkartoj, 100 ekzempl. po fr. 1,50 (60 Sd).

Postulu la suprajn verkojn de via libristo aŭ rekte de la eldonisto. Al societoj esperantistaj, favoraj prezoj.

PETEGO !!!

La **Esperantista Grupo Hannover** (fondita la IIªⁿ de junio 1907) intencas fari en la komenco de la sekvonta jaro *ekspozicion* por vivigi la movadon en tiu ĉi granda urbo kaj por varbi multe da interesontoj pri la kvara kongreso. Pro tio, ĝi petas la grupojn, konsulejojn informejojn, eldonejojn, gazetojn, k. t p. de ĉiuj landoj, ke ili bonvolu sendi al ĝia prezidanto: *P. Tarnow*, stud. tekn. Asternstr. 16. *Hannover* (Germanujo) du aŭ tri ekzemplerojn de ĉiaspecaj propagandiloj Esperantaj (gvidlibroj, gazetoj, katalogoj, reklamoj, k. t. p.). Oni petas *repostuli* la elspezojn *Multekostajn* aferojn oni *ne* devas sendi.

La plej bona, por la sama prezo,
La plej ĉarma farota surprizo,
En ĉiu festeno respektinda,
Estas proponi vinon **MIRINDA**.

Sin turni al S-ro Ch. JADEAU,
en Mercurey (S.-&-L.) Francujo.

ESPERANTINE

Digestiga Likvoro

Alprenita ĉe la IIª Kongreso

Prezo: (Francujo) 11,50 fr. (la kesto de 2 botelojn).
(Alilande) 4 fr. (ĉiu botelo kaj transporto)

Tenejo: *J.-B. Brunon-Chauvet, St-Etienne (Francujo).*

Libramantoj, Atentu !

Ĉiuj libramantoj Esperantistaj devas aniĝi en l'*Union des Bibliophiles* (Direktoro L. Mopty) se ili deziras: 1º vendi je bona prezo siajn malnovajn aŭ al si senutilajn librojn; 2º havigi al si laŭokaze kaj je favoraj kondiĉoj, novajn librojn (Esperantajn aŭ nacilingvajn). — Por ricevi informojn pri la *nova Esperanta gazeto*, organo de tiu Unuiĝo (4 fr. jare, ekster Francujo) kaj la regularon, sin turni al *S-ro E. Philippe, en Aubry (Nord-Francujo)*, sekretario de Fredakcio, Esp. Kons. kaj agento de « Esperanto », sendante simplan karteton kun literoj U. B.

Signoj esperantistaj ĉiuspecaj :

Steloj verdaj, flagoj blankaj, el bona emajlo, dauremaj, bone fabrikitaj

Por societoj po 100 ekzempl. Fr. 24,00 riceveblaj ĉe

A. H. Rudolf, Reichenberg, Bohemujo.

Oni postulu prezaron specialan.

Monata kroniko

Oktobro 1907.

La monato Oktobro estas en multaj landoj la signalo por la rekomenco de l'aktiva vivo politika. Kiel taŭgas al sia historio, Francujo unua remalfermis sian Parlamenton. Laŭ la plej multaj profetemaj gazetoj kaj politikistoj, la nuna situacio de la ministraro estas tre bona; ĝi estus eĉ neŝancelebla, se, en politiko, oni ne devus antaŭvidi ĉefe la neantaŭvideblon. Efektive, la ministraro Clémenceau sciis lerte venki lamulte nombrajn malfacilaĵojn, kiuj prezentiĝis: la tumultoj en Sud-Francujo estis kvietigitaj, la Marokaj aferoj, pri kiuj oni timis malagrablajn sekvojn, notinde pliboniĝis, antipatriotismo estas fervore kontraŭbatalata, eĉ de la socialistoj, la klerika opozicio silentas, kaj la laŭrenta imposto, kiu timigas tiom da deputatoj, estas ankoraŭ malproksima eventualaĵo; oni do ne vidas ian gravan malhelpon, kiu povus minaci la nunan ministraron. Sed la naturaj fortoj ne estas tiel indulgemaj: la malfeliĉaj Sud-Francaj regionoj, jam atakitaj de la mizero, estis domaĝigitaj de ruinigaj superakvoj, kiel ankaŭ en Hispanujo.

Italujo estis vizitata de la ĝenerala striko en Milano kaj de provo de striko de la fervojistoj, kiuj estas ŝtatoficistoj. La unua tute sukcesis, dum la alia ne havis favoran rezultaton por la laboristoj. La sudaj regionoj kiuj tiom da fojoj estis ruinigitaj per tertremoj, estis denove frapitaj per tiu malfeliĉo, kiu mizerigis milojn da homoj.

En Aŭstra Imperio la malsano de l'maljuna imperiestro dum kelkaj tagoj okupadis la publikan atenton. Nun, kunvenas la Parlamento; ĝi ekzamenas la gravan kompromison, kiu, post multaj klopodoj, estis proponita por solvi la ekzistantajn malkonsentojn inter Aŭstrujo kaj Hungarujo.

Tiu interkonsento estos verŝajne akceptata, kvankam ĝi estas ricevata malpli favore en Hungarujo ol en Aŭstrujo. En la unua lando, la popolo organizis vastegan manifestadon por la universala balotrajto' kiu ankoraŭ ne ekzistas.

Malgranda najbara lando, Serbujo, estas tre agitata. La reĝado de Petro Iª, komencita sub malfavoraj kaj malgojaj aŭspicioj, renkontas senĉese multiĝantajn malfacilaĵojn sur sia vojo. La publika opinio nun staras kontraŭ ĝi kaj oni povas antaŭvidi, ke, per nova bato de l'sorto, la nun reganta dinastio estos siavice ŝancelata.

En Germanujo, ŝanĝo en la ministrajo de l'eksterlandaj aferoj; la malnova diplomato Tschirschy, kiu, kvankam nekonata, tenis multajn fadenojn de la internacia politiko, eksiĝis kaj estis anstataŭata de Vilhelmo Von Schön; oni rimarkis, ke tiu ŝanĝo koincidas kun ŝanĝo de la Germana politiko en la Marokaj aferoj Sed la publikon ĉefe priokupis la skandala proceso de Moltke-Harden, en kiu estas implikitaj personoj, kiuj iam proksime rilatis kun la imperiestro: la nuna proceso kiu havis politikan kaj moran flankon, estas por ili tute malfavora kaj estos esperebla la komenco de necesa reordiĝo,

Belgujo estas okupata per la grava demando pri la transcedo de Kongolando; tiu ŝanĝo ne okazas sen malfacilaĵoj, tiom pli ke la reĝo Leopoldo IIª deziras, ke la kontrolo de la Belga Parlamento pri la Kongolandaj aferoj estu kiel eble plej limigita. Aliparte, la balotoj de la komunumaj konsilantaroj, kiuj tiun jaron, prezentis politikan gravecon, estis ĝenerale favoraj al la nun reganta katolika regnestraro, kvankam en multaj lokoj, liberaloj kaj socialistoj formis antiklerikan kunligon.

El Britujo venas al ni la antaŭvido pri vastega striko de la fervojistoj, kun kies asocio la kompanioj tute ne volas rilati. Se ĝi okazos, tio ĉi estos verŝajne longa batalado, ĉar ambaŭ kontraŭstarantaj potencoj havas rimedojn por elteni dum longa tempo.

⁂

En Unuigitaj Statoj okazis grava financa krizo kun ĉiuj sekvoj kaj freneziĝoj, kiujn efikigas tiaj aferoj. Tio estus parta konsekvenco de la militiro entreprenita de prezidanto Roosevelt kontraŭ la trustoj.

⁂

Fine, la Haga konferenco finis siajn laborojn; el tiu longega kunveno rezultas diversaj rezolucioj, kiuj reguligas diversajn punktojn pri milito surtera kaj surmara kaj teoria decido pri la deviga arbitracio. Tio ĉi certe ne kontentigos la konvinkitajn pacifistojn, sed ili kontentiĝos per tio, ke ju pli multiĝas tiaj konferencoj, des pli proksimiĝas — malrapidege, sed certe — epoko, kiam la paco senarma estos realaĵo.

A. R.